

Edmond Privat : *Interpopola Konduto*, 8-a parto
Ŝtato kontraŭ Ŝtato, Eklezio kaj Ŝtato
Claude Gacond, 380-a radioprelego, 1971.01.20 & 23

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni daŭrigas la legadon el la bedaŭrinde elĉerpita verko de Edmond Privat : *Interpopola Konduto*. La pasintan semajnon ni legis al vi la komencon de la sepa ĉapitro, kies titolo estas *Ŝtato kontraŭ ŝtato*. Hodiaŭ ni citos ĝian finon. Inter ambaŭ citaĵoj Edmond Privat analizis la konfliktojn, kiuj ekzistas inter la individua moralo kaj la ŝtata moralo. Li konstatis, ke tiu konflikto ofte ne ekzistas ĉe la ŝtatistoj, diplomatoj kaj ĵurnalistoj, kies persona moraleco estas direktata al la servado de la naciaj interesoj.

A.- Patrio estas por ili la plej supera plafono : ne ekzistas alia devo super la nacia devo. Pro tio ne estas konflikto inter pli universala moraleco kaj la nacia limigita moraleco.

Cl.- Post tiuj kelkaj klarigoj jen ni legas al vi, kion diras Edmond Privat fine de tiu bedaŭrinde aktualega ĉapitro :

A.- *Kiel la milito samtempe uzas la heroecon de l' bravulo kaj la brutalecon de l' krimulo, tiel same ĉion kune utiligas la nacia batalo dum pactempo. La sindono de l' oficisto lojala al sia regno, la takto de l' diplomato, la fido de l' patrujamanto, la fervoro de l' verkisto, ĉio ĉi kunvarbiĝas al ĝia servo kune kun la ruzeco, la sinpuŝo, la vanteco, la malklereco, la fiereco kaj la malamo de la plej difektitaj homoj, kies difektoj mem servas la nacian celon kune kun la noblaj ecoj de l' aliaj.*

Cl.- *La naciaj dioj similas tiujn antikvajn idolojn, kies adorado postulis samtempe sanktulojn, asketojn, oferantojn kaj templajn malĉastulinojn.*

A.- *Super la nacia politiko ekzistas do nenia moralo kapabla instigi eĉ la plej etan reziston. Por ĉiu, la sankta plafono de l' patrujo ludas la rolon de plej supera ĉielo. Nu, tiuj malsamaj ĉielo kondutas kiel nuboj. Ilin al tondro puŝas la vento kaj ekfalas la hajlo sur ĉiujn popolojn.*

Cl.- *Por ke la blinda nacia fervoro trovu haltigan bremson sur la vojo al katastrofo, necesus ia interŝtata moralo, baranta la sinpuŝajn kaj brutalajn kutimojn per aliaj pli mildaj kaj pli saĝaj moroj, kiaj ekzistas ja inter la anoj de iu ajn aro. Unuvorte, necesus kuna tegmento super la naciaj plafonoj.*

A.- *Ĉar kreis al si ĉiu popolo sian « animon », necesus altigi ĝin al la sento pri supera kuneco. Alie ĝi estas animo ne kompleta kaj netaŭga por vivo en socio.*

Cl.- *Nek ideo nova, nek organizo nova sufiĉas por starigi realan moralecon. Necesas krome la kutimo kaj emocioj. Fakte, la rilatoj inter la ŝtatoj estas ankoraŭ multe malpli progresintaj ol la rilatoj inter la homoj. [...] Ĝis nun la naciaj aroj kutimis inter si konduki kiel inter si kondutas uloj sen ia ajn moraleco. Eĉ la sento de l' amasoj malfruas rilate al la faktoj, ĉar aperis jam kelkaj ekkutimoj etikaj inter ŝtatoj, sed ili ankoraŭ ne postlasis sian stampon en la popolaj emocioj. [...]*

A.- Post tiu observado pri la rilatoj inter la ŝtatoj Edmond Privat turnas siajn rigardojn al la rilatoj inter la eklezioj kaj la ŝtatoj. Estas la titolo de la oka ĉapitro : *Eklezio kaj ŝtato*.

Cl.- El tiu sufiĉe longa ĉapitro ni citos nur kelkajn erojn, ĉar multaj ekzemploj memorigas eventojn, kiuj nun estas iomete forgesataj. Tamen la situacio ne multe ŝanĝiĝis. Jen ni legas al vi la ĉefajn dirojn de Edmond Privat :

A.- *La kristanaj eklezioj instruas ja sinkritikon, sed plej ofte rezignas instigi al ekzameno de l' kolektiva si en formo nacia. La tutan homaron ili proklamas kulpa, sed nur la individuajn pekojn ili rekonas. [...]*

Edmond Privat : *Interpopola Konduto*, 8-a parto
Ŝtato kontraŭ Ŝtato, Eklezio kaj Ŝtato
Claude Gacond, 380-a radioprelego, 1971.01.20 & 23

Cl.- Edmond Privat nin atentigas, ke la eklezioj ĝenerale sin submetis al la prinacia religio. Ni ree citas lin : *Eŭropaj militoj devigas samekleziajn pastrojn preĝi en kontraŭaj sencoj. Oficiraj gazetoj ekzamenas la influon de l' armeopastroj al la kuraĝo de l' soldatoj kaj al la venko ĝuste sammaniere kiel ili mezuras la efikecon de gaso aŭ nova pafmaŝino.*

A.- *Se ribelus la eklezioj kontraŭ tia subigo, se ili ekjuĝus la nacian moralon de la ŝtato en la nomo de alia principo tutmonda, ili estus forigitaj de la publika vivo kaj persekutataj en sia instruado. [...]*

Cl.- *Sub servado al la prinacia religio de la ŝtatoj, la Eklezio regajnis sur la kampo tera multon el la perdita grundo. Eĉ sur la kampo spirita, ĝiajn proprajn dogmojn la filozofoj malpli atakas, de kiam ĝi kliniĝis al tiu ekstera dogmo.*

A.- El tiu ĉapitro ni legos al vi ankoraŭ du asertojn de Edmond Privat :

Cl.- *Mortis Kristo por ke vivu lia instruo. Ĉiam emas eklezioj moderigi sian instruon por ke ili vivu mem. [...]*

A.- *Ilia edukado de l' animoj kaj de la karakteroj preparas individuajn virtojn, kiuj poste servas kolektivajn malvirtojn anstataŭ ilin korekti. Estas vera tragedio.*

Cl.- La venontan semajnon ni daŭrigos la legadon de tiu pripensiga verko *Interpopola Konduto* de Edmond Privat.

A.- Tiu libro vin eble helpas pli bone kompreni la nunajn interpopolajn okazaĵojn.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-